Monda Medicina Asocio

# Deklaracio de Ĝenevo

Akceptita de la
2-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Ĝenevo, Svislando, Septembro 1948
kaj reviziita de la
22-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Sidnejo, Aŭstralio, Aŭgusto 1968
kaj reviziita de la
35-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Venecio, Italio, Oktobro 1983
kaj reviziita de la
46-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Stokholmo, Svedio, Septembro 1994
kaj lingve prilaborita okaze de la
170-a Estrarkunveno, Divono-la-banoj, Francio, Majo 2005, kaj de la 173-a Estrarkunveno, Divono-la-banoj, Francio, Majo 2006
kaj reviziita de la
68-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Medicina Asocio, Ĉikago, Usono, Oktobro 2017

**Promeso de la kuracisto**

Kiel membro de la medicina profesio

mi solene promesas dediĉi mian vivon al la servo de la homaro.

La sano kaj bonfarto de mia paciento estos mia ĉefa konsidero.

Mi respektos la memstarecon kaj dignecon de mia paciento.

Mi tenos la plej grandan respekton al la homa vivo.

Mi ne permesos, ke konsideroj de aĝo, malsano aŭ handikapiteco, kredo, etna origino, sekso, nacio, politika aneco, raso, seksa orientiĝo, socia pozicio aŭ ajna alia faktoro staru inter mia devo kaj mia paciento.

Mi respektos la sekretojn, kiujn oni konfidas al mi, eĉ post la morto de la paciento.

Mi praktikos mian profesion kun konscienco kaj digno kaj laŭ akordo kun bona medicina praktiko.

Mi vartos la honoron kaj noblajn tradiciojn de la medicina profesio.

Mi donos al miaj instruantoj, kolegoj kaj studentoj la respekton kaj dankemon, kiujn ili meritas.

Mi kontribuos mian medicinan scion por la bono de la paciento kaj la progreso de la sanprizorgado.

Mi zorgos pri miaj propraj sano, bonstato kaj kapabloj por havi la eblecon liveri sanservojn de la plej alta nivelo.

Mi ne uzos mian medicinan scion por malrespekti homajn rajtojn nek civitanajn liberecojn, eĉ se minacite.

Mi promesas ĉion ĉi solene, libere kaj akorde al mia honoro.

***

Oficiala Esperanto-traduko de la Deklaracio de Ĝenevo,
agnoskita de la Monda Medicina Asocio